FLAM 8

Analizo okazinta kadre de AMO 59 en Timişoara, Rumanio, okt. 4-6 2019

Laŭ la kutima skemo, oni denombris la Fortojn kaj Lamaĵojn de la Rumana movado kaj poste faris similon pri la pozitivaj kaj negativaj faktoroj, kiuj venas de ekstere sed influas la movadon. La plimulto de la rikoltitaj komentoj fluis el raportoj el diversaj urboj pri plenumita laboro tra la lasta jaro.

La plimulto el la sekvaj rekomendoj fontas el projektoj, kiujn ili jam en Rumanio realigadas. Rimarkeblas el la foto la kapablo altiri pli junajn aktivulojn!

Rekomendoj el la FLAM-analizo por plibonigo de landa agado:

1. Partoprenu en Internaciaj aŭ Eŭropaj:Tagoj, Jaroj aŭ Festivaloj.
2. Intensigu la akcepton de eksterlandaj vojaĝantoj aŭ preleg-vojaĝoj.
3. Ekuzu ĉiujn eblojn(interalie la suoprajn) por plenumi intervjuojn ĉiuspecajn.
4. Altigu la troveblon kaj vizitadon de E-retejoj kaj kursoj.
5. Realigu pli intensan kontaktadon inter la membroj – ĉu fizike, ĉu rete.
6. Landa Asocio ampleksigu siajn partnerajn rilatojn kun ekstermovadaj instancoj.
7. Stimulu internaciajn kontaktojn kaj projektojn – ekzemple lernejajn.
8 Okazigu pli da kursoj, laŭeble kadre de pli grandaj nemovadaj projektoj.